# *Sesias la politika konsilantaro de ALBA-TCP favore al la regiona integri?o*




Havano, 21 maj (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel asertis ke la politika konsilantaro de la bolivara alianco por la popoloj de Nia Ameriko- Traktato de komerco por la popoloj (ALBA-TCP) estos spaco por defendi Venezuelon.

Per mesa?o en Twitter, la kuba prezidento esprimis ke en tiu ?i kunsido oni anka? savgardos la sociajn konkerojn de la regiona organizo fondita en 2004.

Tiu ?i renkonti?o estos okazo por esplori novajn eblecojn de regiona integri?o kaj konfirmos la volon de unueco, kunlaboro kaj solidareco inter la membraj landoj fronte al la nuntempa kojunkturo.

La organizo kunsidanta en Havano estas formita de la ministroj de eksteraj rilatoj de ?iu membra lando, kaj la celo estas asesori la prezidentan konsilantaron de tiu platformo integriga en temoj strategiaj, krom prezenti proponojn de aferoj pri internacia politiko.

Bolivio, Kubo, Dominiko, Grenado, Nikaragvo, San Kristoforo kaj Neviso, San Vicento kaj Grenadinoj, Surinamo kaj Venezuelo estas membroj de ALBA-TCP, kiu defendas la proklamon de Latinameriko kaj Karibio kiel paca zono, adoptita en la pintkunsido de la komunumo de ?tatoj latinamerikaj kaj karibiaj en januaro de 2014 en Havano.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/191331-sesias-la-politika-konsilantaro-de-alba-tcp-favore-al-la-regiona-integrigo

**Radio Habana Cuba**